# LA JUNA PENSO

duobla numero 103-104

ISSN 0337 5838




La Juna Penso, baldaŭ organo de "SAT - Junulfako" (ne certe...)
7 fois par an - 7 fojis Jare
septembro - decembro 1976
67 ave. Gambetta - F-75020 PARIS
Prezo : 3 FF




Gérant : BAUDÉ . Impr. : LE GALÈS
67 rue de Franceville - 93 GAGNY
CPPAP : n° 39863

Post la kongreso de Gotenburgo, ĵus aperis nova libro, redaktita de kolektivo kie partoprenis membroj de PK. de SAT ; ĝin oni povas akiri ĉe SAT-sidejo aŭ ĉe via loka peranto.
Tiu libro, kiu titoliĝas :
"MI SCIAS DEMOKRATE VOĈDONI EN SAT-KONGRESOJ", en la konata serio "MI SCIAS ĈION FARI", ebligos vin spertiĝi en la delikataj voĉdonoj.
Prezo : 52.00 F
Rabato por la politikaj partioj, sindikatoj, manovristoj.

---

MUZIKA INTERNACIA SOCIETO ĵus atribuis sian premion al SAT pro la dufoja mirinda ĥoro dum la Gotenburga kongreso ("La Internacio").
Plie, speciala premio estis atribuita al la junaspekta orkestro, kiu distris nin plej vigle per elektra gitaro okaze de la unua vespero.

---

ONI SERĈAS spertan esperantiston, pure zamenhofan, por redakti niajn intervenojn okaze de la venonta Kongreso.
Ido kaj Idino.

---

GRAVA SUKCESO POR LJP !
Okaze de la ĵus pasinta Kongreso en Gotenburgo, ni konstatis, ke tre multe da legantoj ekstreme atente legis nian modestan kaj elstaran zageton : ni deziras ĉi-tie danki al tiuj, kiuj ne hezitis publike citi niajn plej viglajn artikolojn, antaŭ la kongresanaro.

---

Kun granda bedaŭro, ni ĵus eksciis, ke K-do Olof PALME, eks-ĉefministro de Svedio, maltrafis ŝtupon politikan, kaj nun estas en hospitalo. Ni kondolencas al ĉiumondpartaj social-demokratoj.
Feliĉe, ke SAT-kongreso okazis antaŭ tiu drama evento.

---

ONI SERĈAS personojn, kiuj kapablas malpurigi siajn manojn por certigi la aperon de nia venonta numero. SERIOZE.
Intelekto-masturbuloj kore invititaj.
Sin adresi al la redaktejo.

---

K-do Lin Piao, daŭre perdita en nekonata regiono de Tibeto, petas ŝian panjon.
Sin adresi al infangardejo.

---

La Konferenco de Neŭtrala Esperanto movado ĵus finiĝis en Parizo.
Ni eksciis pri la geedziĝo de Gesinjoroj Lapenna kaj Fernando de Diego.
Gratuloj ! (Grat-uloj).

---

POR AKIRI ANKORAŬ PLI GRANDAJN VENKOJN, vi nepre legu la ĵus aperintan broŝuron "Kiel alpreni, konservi kaj repreni la povon", de Deng Hiaŭping.
Jam granda sukceso en Popola Ĉinio !

---

ONI SERĈAS bonan desegniston por la venonta eldono de PIV.

---

FOR LA MONOTONISMON !
FOR LA VERDKLAĈAĴOJN !
FOR LA TEDIĜON !
FOR LA SENINTERESAJN GAZETOJN !
FOR LA SENSIGNIFAJN ARTIKOLOJN !
FOR LA ASOCIAJN BULTENOJN !
FOR ĈION ! (Por resumi).

Ek de nun, nova revuo, politika kaj kultura,
objektiva kaj subjektiva,
muzika kaj poetika kaj beletra
kaj tiel plu.

LA NUMERO NULO DE LA KANCERKLINIKO ĴUS APERIS !
Elstara enhavo, inter kio : Dosiero pri "Vivo kaj morto de ŝtathomo : Maŭ Zedong", Sciencfikcia novelo de Bob Shaw, modernaj poemoj kaj diversaj rubrikoj.

Redakto-komitato : Jopetro Danvy, Ĵak Le Puil, Laŭrenco Septier.

ONI ABONAS ĜIN ĉe Jopetro Danvy, 6 rue Jean Dolent, F-75014 PARIS, pĉk : CCP PARIS 12494 52.
Prezo de unujara abono : 20.00 FF
Po ekzemplero : 5.00 FF
Aperas kvarfoje jare.

---

Limdato por ricevo de manuskriptoj (LJP) : necerta.

---

Raportoj pri la kongreso de Gotenburgo : en iu el la venuntaj n-roj.

Profitante de la sperto kiun 3 jaroj da konstanta prizorganteco en kondiĉoj diversaj - de ckaza helpanto al plenpartoprenanta teamano kaj sub 2 ĉefredaktoroj malsamaj - aldonas al 2jara leganteco, mi provus iomete pli analize priskribi la fenomenon LJP, ĉar tion mi ne trovis en la 5 jarkolektoj kiujn mi posedas.

Kio karakterizas L.J.P.on ?

+ Unue, ĝi estas redaktita en Esperanto. Unua devigo kiu kaŭzas multajn malfacilaĵojn. Interaliel, la "merkato" tre malgrandas. Ne vere pro la nesufiĉa nombro de Esperantistoj, kvankam pri tio necesas agi, sed ĉar jam ekzistas pli ol cent revuoj, bultenoj, ktp, kaj ke la averaĝa verdulo ja preferas aboni preskaŭ ekskluzive asociajn bultenojn plejofte sen-interesajn sed facile pageblajn, kaj en kiuj li povas legi pri la malfacilaĵetoj kaj la neniioj de la movado, ol serĉi iom pli la gazeton pritraktantan temojn kiujn li legus en sia nacilingva gazetaro. Ĉiuj gazetoj iom interesaj plejofte estas eksterasociaj, kaj devas vivdaŭri dank'al malpli ol 1000 subtenantoj. Tio ankaŭ implicas la problemon de la prezento, allogo, neebla en tiuj modestaj presokvantoj. Tamen, ni rimarku la eltrovemon de ĉiuj redaktantoj, kaj ilin gratulu.

+ Due, historie, fontas ĝi el asocia volo., Krom generaĵo de minoritata asocio, estas ĝi pli/malpli organo de fantoma fako, kaj havas do neniun apudan bazon. Staras ĝi, kiel insulo. Tion klare montras la provoj de pluraj prizorgi(a)ntoj aŭ ĝin rekte ligi al Sat, aŭ ĝin vole envicigi en la skipo de la sendependaj gazetoj.

+ Trie, kaŭze de tiuj-ĉi faktoj, dufaceta problemo ekstaris :
- la neceso ligiĝi kunlaborantojn kaj prizorgantojn
- la neceso ligiĝi abonantojn.

Kiu prizorgas L.J.Pon? Jen demando tre simpla : neniu. Sen ligoj asociaj, sen ligoj eĉ kun literatura klubo aŭ pensa skolo, sen eĉ la elstara personeco de fondinto ("personiĝo"), vagadas ĝi de teamo al teamo, laŭ la hazardoj de la periodo, kaj de privataj rilatoj.

Fakte, ĉiu LJP-teamo estas plenpova kaj povas fari kion ajn ĝi ŝatas fari. Tio ja ligas ĝin al la prizorgantoj, kaj en ĝia historio kvazaŭgepatraj sintenoj manifestiĝis.

Same, eks-prizorgantoj, kelkaj el la respondeculoj (aŭ eks-respondeculoj) de la antaŭa ŝirmo-structuro, kaj delongaj abonantoj prenis strangajn sintenojn de "mentoreco", kaj opinias ilian entrudon kiel nepran.

Se la funkciado de la gazeto lamas, helpo kaj kuraĝigo estas facile troveblaj, male se iu decidas liberiĝi de tiuj influoj por redakti siaopinie, akraj kondamnoj pluvos.

Ni ja estas en tiu sistemo de negativa influo, kaj de kibernetika reguligo laŭ principo de resto de la gazeto en senbrilaj akvoj, por neniun kontentigi aŭ malkontentigi.

La neceso ligiĝi abonantojn fidelajn same efikas. Kial ligiĝi al gazeto kiam ekzistas jam multaj, kaj kiam la esperantistaro estas tiom stranga ke gazeto eldonita en 1 ekzemplero ja ne estus ridinda, kaj cetere ja estus povinta "pliriĉigi nian kulturon" pli ol kelkaj bultenoj pli impone presitaj ? Kial ? Car vi mem partoprenas, ekzemple skribante artikolojn.

Jen dua negativa influo, la aboniĝo kaj ligiĝo al la gazeto estante kondiĉigita de la apero de artikoloj, kaj la publicista intereso de ĉi lastaj estante tiom malegala, necesus, se vi deziras redakti sufiĉe kontentigan gazeton, mem elekti la legantojn ! Feliĉe tamen tio ne estas la ĝenerala kazo, sed tielaj sintenoj svarmas en la leteroj ricevitaj de la ĉef-prizorganto, devigante lin, se li zorgas pri la intelekta nivelo de la gazeto, al sendado de delikataj respondoj, kaj al personaj atakoj.

Jen do la du eblecoj por prizorgantaro :

| | |
|---|---|
| - helpo kaj komprenemo | - kontraŭaj sintenoj |
| - artikoloj oftaj | - artikoloj valoraj |
| - abonantoj | - kelkaj malabonoj |

Kiel reaĝi al tiu situacio ? simpla respondo sufiĉas. Necesas ke la prizorganta teamo kapablu :

(1) Daŭre plibonigi la gazeton kaj riĉigi ties enhavon
(2) Daŭre administri kaj prizorgi ĉiujn materiajn problemojn kaj presadon
(3) Daŭre sin defendi kontraŭ la atakoj, foje nem ataki por sekurigi sian pozicion.

Tamen, tio ne estas la solaj taskoj kiujn devas plenumi la teamon. Ĝi povas nur aperi kiel kredinda se agas ĝi sur aliaj kampoj, tio estas ĉefe propaganda kaj asocia. Ĉio tio krom dungita laboro por gejunuloj havante aliajn okupojn kaj zorgojn iliaaĝajn kromajn. Se la teamo ne enhavas almenaŭ ses plenrespondecajn anojn, vi facile povas diveni kial neniu el la teamoj sukcesis transformi profunde LJP-on, kaj ofte finis sian prizorgotempon per seniluziiĝo, ofte entute forlasis la movadojn.

Tio jam okazis plurfoje, kaj eblus sin demandi kial L.J.P. daŭre travivis tiujn eventojn. Almenaŭ 2 kialojn mi rimarkis :

(1) La relativa tutpoveco kiun la prizorgantoj posedas, kaj la impreso de tutpoveco kiun ili spertas komence, kuraĝigas ilin al novaj iniciatoj kaj komunikas al ili kuraĝon por alfronti novajn malfacilaĵojn. Tiuj eventoj klare okazis komence de la 2 lastaj prizorgotempoj,(vidu ekzemple la diskutojn de la pariza kongreso kaj L.J.P. 95).

(2) La homa menso, kaj pli precize maljuna spirito (tre plimulta en E-istaj medioj) ofte konsideras plumivadon kiel celon. Se tio valoras por homo, tio ne estas la kazo por gazeto. Halti aŭ krei gazeton estas tro maloftaj eventoj en nia medio. Domaĝe, ĉar tio pruvus viglecon de la ideoj. Sed eble tio estas nur la materiiĝo de la inerteco de multaj.

Kiel videble, la vivokialoj de L.J.P. estas artefaritaj, kaj tiu malagrabla sento jam delonge estas perceptebla. Jam delonge, L.J.P. provis esti organo supertendenca de agantaj fakoj. La neagemo de ĉi-fakoj kondamnis tiun elirvojon. Jam delonge, L.J.P. provis esti rimedo kontraŭ la informkoncentriĝo kadre de SAT. Sed tiu elirvojo eblas nur kadre de asocia agado, kaj la konstanta prokrasto de la ebleco aboni L.J.P.on samtempe kiam aliĝi al SAT tion kondamnis.

Fakte, L.J.P. nun serĉas siajn alirvojojn. La propono de A.S. kaj J.P. Levy ĝin transformi en 4 paĝa bulteno de renaskiĝonta SAT-junulfako estas unu el ili, sed ĝi supozas radikalajn ŝanĝojn, kio cetere kontraŭus multajn principojn de kutima problemsolvigo.

Tion faris la proponkomisiono de la SAT-kongreso en Gotenburgo. Akceptante la pridiskuton de la propono de gek-doj Levy kaj rifuzante la kreon de komisiono por pritrakti la L.J.P.-problemon, ĝi decidis :

+ Ke eblas kontraŭstari la tutan evoluon de la gazeto iam ajn, tio estas decidi ke kunvenoj de abonantoj estis nevalidaj, ke elekto de teamo povas esti nuligita, ke proponoj pri tuta ŝanĝo povas esti tuj realigataj.

+ Ke decidrajtas pri LJP la SAT-anaro, tio estas almenaŭ 80 % uloj nek abonantoj de L.J.P., nek cetere junuloj.

Tio klare retiras al la kutimaj kategorioj de subtenantoj priskribintaj ĉi-supre (malnovaj abonantoj, eksprizorgantoj, nuntempaj kunlaborantoj, kaj nuntempaj prizorgantoj) la rajton influi la gazeton. Evidente same por la abonantoj ne Sat-anoj (ĉ. 1/3 de la abonantaro).


Antaŭ aliaj instancoj ol Esperantistaj, tio tutsimple estus kontraŭleĝa. Tiaj decidoj en la situacio priskribita en tiu-ĉi artikolo povas absolute ĉion aŭguri - sed tio ne plu estas la kampo de analizo.

J. P. DANVY

De pli ol naŭ jaroj, mi estas esperantisto; tio kaŭzas, ke ne mloftaj estas pli oldaj personoj, legantoj de LJP, kiuj estas, kompare kun mi, novbakitoj. Tiu pozicio ŝajne estas kaŭzo por miskomprenoj kaj falsaj diskutoj : mia kono de esperanto-movado estas sufiĉe vasta, kaj mi opinias min tute rajtigita por min esprimi senpere pri nia movado. Bedaŭrinde, malgraŭ sep jaroj de SAT-aneco, mi neniam povis renkonti esperantiston kiu scias paroli pri io alia ol tiu fifama "movado"; escepte de kelkaj personoj, kiel Ĵak Le Puil aŭ Jopetro Danvy, kiujn mi konsideras pli kiel amikojn ol kiel esperantistojn, ĉiuj aliaj konatoj miaj kiuj scipovas la lingvon nur kapablas paroli pri "movadaj" aferoj.
Se ili partoprenas manifestacion, ili unue celas konigi nian aferon. Se ilin oni demandas pri biologio, ili parolas pri lingvo, kaj se oni alparolas ilin anglalingve, ili kvazaŭ kolapsas.
Ankaŭ, mi estis dum ses monatoj pagita oficisto de Unuiĝo Franca por Esperanto (mi ne insistos pri la tiama sinteno de kelkaj SAT-anoj rilate al mia posteno ...); kaj ankaŭ tie mi nur aŭdis pri "movado". Kun mia kunulino mi partoprenis la SAT-kongreson en Gotenburgo: unua rimarko, estas ke ŝin oni tute ne priatentis, kaj se jes, kvazaŭ nur por esprimi malestimon al ŝi, ke ŝi estas la kunulino de tiu "sabotanto" (krom kelkaj esceptoj). Oni atentis nur min el la paro, ĉar mi ja estas delonga membro de la MO-VA-DO.Malgraŭ, ke mi estas freneza ekstremisto. Stranga sinteno en asocio kie oni nepre bezonas novan sangon, kaj kie, kutime, oni almenaŭ provas (se ne sukcesas !) afable akcepti gekomencantojn.
En tiu kongreso, oni nur parolis pri movado, sed atentu, ne pri E-movado, nur pri SAT-movado (guteto en la guto ...). Se ne temis pri movado, oni tiam invitis unujn el la plej belaj perfiduloj el la tutmondo : estraranoj de reganta partio de Svedio ... mirinda laborista sinteno !
Oni fine juĝis min sur publika podio : K-ino Glodeau verŝajne pasigis la tutan lastan jaron en arigo de kvazaŭ procesa dosiero kontraŭ mi, por pruvi, ke mi estas nestabila infano. K-do Lévy-la-patro uzis sian retorikan sencon (feliĉe, kune kun papero kaj mikrofono ...) por elmontri la samon. Gek-doj Lévy-la-gefiloj-de-sia-patro laŭtlegis belajn paroladojn, sed kiam oni petis al ili resumi la finon ĉar tro longa estis la papero, ili ne plu sciis sian gramatikon ! KIU DO VERKIS ILIAN PROZON ?
El ĉio tio mi konkludas, ke, malgraŭ ke nia movado estas ridinda merdeto inter aliaj mondaj organizaĵoj, en ĝi oni trovas neniam, vere neniam emon al turno eksteren, al nia mondo, al vivo ekster la "movado". Sed, fulmontondro, parolu kun iu ajn pri ni : li/ŝi ne scios pri kio vi parolas ! Ni estas tute etaj, kaj prenas nin jam por gravuloj, ni taksas nian movadon kiel plej gravan aferon en la mondo !
En multe da aferoj, nia agado ne nur ne utilas por aliaj, sed plie eĉ ne utilas por ni (ekz. Gvidrezolucio de la lasta kongreso).
Sed ĉion tion vi jam sciaskaj pri tio konscias !
Dum tiuj sep jaroj da satanoco, mi ja estis membro de aliaj organizoj ... kaj en ili mi faris, mi agis, almenaŭ dekfoje pli konkrete ol en SAT.
Kion signifas tiu KONTROLO, kiun la gefiloj Lévy deziras havi super LJP ? Ĉu ili deziras, ke "nia" gazeto, finfine iom plibonigita, revenu en la linion de l'kara paĉjo ?
Nu, de tro longe mi aŭdas pri "movadaj" aferoj, de tro longe mi mem viktimiĝas de ili, de tro longe mi zorgas pri tio. Do, gek-doj Lévy, vi volas kontroli la gazeton : vi eĉ sukcesos havi pli. Jen LJP : prizorgu ĝin. De tri jaroj mi laboras, plia tempo estus tro.
El LJP vi eble sukcesos fari alian MOVADAN gazeton, nome tiu de fantoma SAT-junulfako, kaj tiel vi eĉ perdos la fruktojn rekoltitajn de ni. Bonan kuraĝon do, kaj ne forgesu, ke se vi deziras legi revuon en esperanto, kiu pritraktas alion ol nia kara "movado", vi ja rajtas aboni nian novan revuon, logika daŭrigo de nia LJP-agado, nome LA KANCERKLINIKO-n.

Laŭrenco Septier.

De du jaroj, kiuj laboras teknike por regule aperigi LJP-on ? Septier (kiu eĉ prizorgis preskaŭ sola unu n-ron antaŭ mia kunlaboro), Danvy kaj mi mem, sen forgesi regulajn helpantojn, kiel R. Meurant, kiu tajpas stencilojn kaj junajn gek-dojn, t.e. Ge-Delepierre, Petro d'Yvoire, Lucile Dejean, Jean-Paul Ducam, Anny Lazarus kaj eble aliaj, kiujn mi forgesas.
ALIAJ grumblis - NI laboris.
ALIAJ daŭre grumblas - Ni laboros ... sen ili.
De du jaroj regule aperas en LJP la artikoloj de la Abundana Frakcio kaj de la Pacista, ĉar ties respondeculoj regule sendis ilin. Ankaŭ aperas ĉiuj artikoloj, kiujn oni ricevis - sen cenzuro - Sed ho ve ! Ankaŭ aperis artikoloj de L.S.D., de anonimuloj ... kaj (fi)desegnoj. Kaj jen la skandalo. Skandalo ĉar oni ne timis paroli pri drogoj (kompreneble neniu laboristo fumas haŝiŝon, tio estas afero de diboĉaj riĉuloj, aŭ de malsanuloj ... cetere tiuj problemoj ne ekzistas en la t.n. "socialistaj landoj", do !), pri samseksemo (kompreneble neniu laboristo estas samseksemulo, nur riĉaj diboĉuloj aŭ malsanuloj estas tiaj - Cetere, ĉu vi jam renkontis samseksemulon en niaj vicoj ?) Koncerne la desegnoj, vere ni troigis !!! nur mankis la papo fikante porkinon ! Stultulaĉoj ! Kretenaĉoj ! Fridpisulaĉoj ! Sed, eble pli grava ol ĉio tio, ni aplombis aperigi kritikojn kontraŭ SAT kaj ho abomeno ! eĉ leteron de ne SAT-ano !
Jes ja estis tempo, ke sanaj (pli malpli) junuloj reagu ! Ke denove ili traktu "laboristajn problemojn", t.e. laborvivo, sindikatumo (reformisma), laborvivo, distro ... Sed ne ia ajn distro, atentu ! Oni legu bonajn aŭtorojn ... ne tro modernaj (ĉu vi kalkulis, kiom da nuntempaj verkistoj estas tradukitaj en esperanto ?). Oni aŭskultu belajn muzikojn ... ne tro modernaj - cetere ĵazo estas sovaĝmuziko - trinkante glason da freŝa akvo kaj lekante karoton. La laboristo des pli bone ripozu, havante apud li afablan edzinon (ĉu vi rimarkis, ke sur la aliĝiloj por SAT-kongresoj, oni petas la nomon de la K-do, kaj poste nur la antaŭnomon de la edzino ?) kaj belajn infanojn, kiuj bone studas por plezurigi siajn gepatrojn.
Sed sufiĉas ! La fantoma Junulfako alvenas. La pensoj ankoraŭ pli juniĝos ... Niaflanke ni dronos en la Kancerkliniko.





Ĵak Le Puil.

REĜUSTIGO.

Pro diversaj kaŭzoj, inter kiuj premoj kontraŭ li, K-do Laŭrenco Septier decidis pardonpeti pro la vortoj uzitaj de li rilate al K-do Ovalde.
Li do demetas la vortojn kiujn oni povus interpreti kiel atakoj kontraŭ la "faŝisto" Ovalde; li agnoskas, ke K-do Ovalde ne estas faŝisto.
Li tamen atentigas la legantojn, ke daŭre li konsideras tiun K-don kiel evidente kontraŭrevolucia kaj manifeste reakcia.

Septier.




Nun la homoj devas organiziĝi kaj mem kunparoli por solvi siajn Problemojn !
Tiel estas!
Komence ni jam parolis pri tio : la manko de loĝejoj estas rezulto de la kapitalisma sistemo.
Ni senindulge traktos ĝin!
Sed kia estas fakte la rilato kun la kapitalismo?
La kapitalismo en nia lando similas al malbona arbo kun malbonaj fruktoj
inflacio
senlaboreco
nutraĵmanko
militismo.
manko de loĝejoj
hi,hi. , kresku, kara arbeto, kresku
Centro Internacia de Agrikulturo
C I A sterko.



ĝis nun oni nur iom pritondis ĝin. Sed la arbo kaj ĝiaj fruktoj restis malbonaj.
inflacio
senlaboreco
nutraĵmanko
manko de loĝejoj
militismo
protestas Natur-Amika Turisma Organizo
Ĝi devas esti ekstermata! ĝisradike!
Fine ni ĉion ankoraŭfoje resumos.
Vi diru, mi notos..
Ankaŭ mi.
VAŬ
1
En la tuta lando estas tro malmulte da domoj, en la urbo kaj en la kamparo. Pri tio kulpas la kapitalisma sistemo.
Tiel longe kiel mizero regas en la kamparo, la homoj migradas al la urboj.
URBO
2
La manko de loĝejoj nur tiam estos forigata, se nia lando ekevoluos.
Ni venkos!
3
Sufiĉe da konstrumaterialoj devas esti produktataj. Ankaŭ la aliaj industrioj devas esti plibonigataj.
laboru, kara maŝinjo!
Plof!
Pip
Pfff
PLOF
PIP
Ploff

## 4


Ni estas ankoraŭ nur ĉe la komenco. Tial ni devas bone pripensi kion ni unue faros. Por decidi pri tio, necesas ke ni organiziĝu!




## 5

Kiam ni estos organizitaj, ni ankaŭ MEM respondecos!



Vi nun vidis, kiel ni pensas pri tiu afero. Sed, ĉu fakte vi scias ĉu en via lando :

- vi povas tuj akiri loĝejon, se vi volas edz(in)iĝi?
- ĉiu familio povas akiri loĝejon sufiĉe grandan?
- ĉiu ajn suferas pro la manko de loĝejoj ?

Kiu(j) respondecas pri la manko de loĝejoj en via lando?

# por la paco

PRI TIO NI PAROLIS EN GOTENBURGO

Federacia Germanio (parolis k-do Kunze)
La soci-demokrata partio iniciatis ŝanĝon de la leĝo pri armerifuze, kiu ebligos al ĉiu junulo elekti inter civila kaj soldata servo. Tamen la civila servo estus 2 monatoj pli longa. Sed la kristandemokratoj malhelpas la finan aprobon far la ŝtatprezidanto.

Nederlando (parolis k-do Geitz)
Pli kaj pli oni volas transiri al profesia armeo. Ekzemple, edzoj kun infanoj ne plu devas soldatservi. Nun estas krom la obĵetantoj ankaŭ la tutaj rifuzantoj, kiel Ger POUW kaj Dick WILLEMSEN, kiuj rifuzas ankaŭ civilan servon. Ilia argumento estas, ke parto de la salajro de la civilservanto iras al ... la ministro de defendado.

Polio
En orienteŭropaj landoj, la situacio estas pli malfavora, kaj plej ofte soldatservrifuzo kondutas al la karcero.

Izraelio
La soldatservrifuza estas tute malkomprenata pro la konstanta militŝtato de la ŝtato. Multaj izraelanoj, eĉ kiam ili jam militservis, servas en la armeo ankoraŭ dum unu monato ĉiujare.

Belgio (parolis k-dino de Weerd)
La ebleco fari civilan servon ekzistas, sed, kiel en Francio, ĝi estas pli longa. Oni intencas mallongigi la soldatservon, ĉar oni strebas al profesia armeo.

Pacismo kaj politiko
K-do Marmin opinias, ke pacista agado ne devas centriĝi je militrifuzo, sed ampleksi la esploradon de la kialoj de la militoj. K-dino Lépeix, opiniante, ke tia pripensado nepre kondutas al politika analizo, intencas aperigi en LJP, en la venontaj numeroj, tekstojn pri tiu evoluado de la neperforta medio, kaj pri la ligo inter neperforto kaj memmastruma socialismo.

Unuflanka malarmado (parolis k-do Kunze)
Bedaŭrinde, eĉ mondcivitanoj kontraŭas ĝin, argumentante, ke subevoluintaj landoj ne povas resti sen armiloj en superarmita mondo. Sed, kiel klarigis letero al la sveda ministro pri malarmado, por kio do mortus multege da homoj ĉe nur kelktaga rezistado de malgrandaj ŝtatoj kontraŭ superpotencoj ?

Larzako (parolis k-dino Lépeix)
Ĉar la verdiktoj de la lasta proceso ankoraŭ ne estas konitaj de mi ĉe la tajpado de la stenciloj, mi promesas por la venonta LJP raporton pri la arestoj, la procesoj kaj la nunaj luktoj.
(raportis k-dino Lépeix laŭ notoj de Bert de Wit)

INTERNACIA NEPERFORTA MARSADO POR LA MALARMEIZADO

Ni kunvenis merkredon la 4an de aŭgusto sur la universitatejo de la urbo Messo. Posttagmeze estis manifestacio en Messo. Mi ne povis partopreni, sed oni klarigis al mi poste, ke la polico malebligis al la manifestacio iri al la malliberejo, kie 4 armerifuzantoj fastadis por esprimi sian perintencan partoprenon al nia marŝado. Sur placo de la urbo, Jean-Louis SOULIE parolis pri sia restado en tiu malliberejo; kaj klaŭnoj ludis skeĉon pri la tribunala kondamno de la oberifusantoj

La 5an komencis la piedirado de proksimume 500 partoprenantoj de vilaĝo al vilaĝo. La loĝantaro ŝajnis al mi nek amika nek malamika, sed nur skeptika aŭ apatia, kaj ne okazis granda dialogo kun ĝi. La 6an de aŭgusto, okaze de la datreveno de la bombado de Hiroŝima, alzacaj kaj badanaj kontraŭatomaj kuktantoj kantis ĥore kantojn verkitajn en ilia komuna dialekto; pri la retrovita amikeco de siaj popoloj kaj ilia unueco en la ekologia batalo kontraŭ la kapitalistaj ekspluatistoj. La vespero finis per la filmo "La bombo".

La dimanĉo 7a de aŭgusto estis la "grava tago" de la marŝado : oni devis iri al Douaumont, la giganta ostarejo, kie estas entombigitaj multegaj viktimoj de la unua mondmilito, por tie fari silentan memoradon. Ni ekscii per la gazetoj, ke 30 asocioj de eksbatalantoj alvokis siajn membrojn iri al Verduno por "malebligi la insultegon" kiun ni, laŭ ili, intencis fari kontraŭ la memoro de iliaj mortintaj kamaradoj. per nia porpaca sinteno.Car ne ebis organizi ĝeneralan asembleon en la tombejo, 4 gekamaradoj ŝarĝis sin pri la traktado kun la polico, la aŭtoritato kaj la eksbatalantoj. Alvenante al Douaumont, ni povis konstati, ke la alvoko de la 30 asocioj ne veksis fajrecan entuziasmon ĉe iliaj membroj, ĉar estis tie nur tre malmulta grupo da maljunuloj (mi dubas, ĉu ili ne estis eĉ malpli ol 30) kaj paraŝutistoj. Sed la pli multaj policistoj ricevis de la departementestro la ordonon protekti tiujn respektindulojn malebligante al la pacista marŝantaro iri tra la tombejo. La 4 gekamaradoj proponis al la departementestro, ke li permesu al 12 marŝantoj reprezantante la 12 naciojn, ek kie venis la partoprenantoj, simbole iri tra la tombejo, sed ankaŭ tion li rifuzis. Ni faris do daŭran sidadon, por atendi, ke oni trovu solvon al la konflikto. Tiu sidado estis trankvilega kaj rilative silenta. Post longa atendado, la 4 gekamaradoj klarigis, ke per tiu sidado ni sufiĉe konigis nian sintenon je la ĉeesto de jurnalistoj, ke ĉiuj povas vidi, ke la departementestro ne hezitas fari malleĝan decidon, kaj do, ke estas strategie pli interesa iri al la antaŭvidita publika debato por tie dialogi kun la loĝantaro de la regiono,ol resti por ludi la rolon de martiroj pri tombeja afero. Tial, post klarigo de advokato DE FELICE pri la franca leĝo; laŭ kiu ĉiu homo rajtas libere iri al ĉiu tombo por tie enpensiĝi, kaj pri la homaj rajtoj, kaj kantinte "Ni venkos en gloro" (sed en angla lingvo !), la plimulto de la marŝantoj iris al la tendumejo. Tamen restis en Douaumont grupo da gekamaradoj, kiuj opiniis la decidon foriri maldemokrata farita kaj konsideris ĝin rezigno. Ili daŭrigis la sidadon; diskutis kun la polico, kaj post momento reatingis la aliajn. La morgaŭan matenon, grupo da nederlandanoj reiris al la ostarejo, sed la polico ree malebligis al ili iri tra la tombejo, kaj forprenis de ili fotoaparaton. Al ilia protestado la policistoj respondis "La leĝo estas ni." Do la pruvo estas farita : en Francio, la leĝo pri libera irado al tombejo estas aplikata egale al ĉiuj, sed tiuj, kiujn la memorado pri murdego instigas al porpaca sinteno estas iomete malpli egalaj ol la aliaj homoj. Eĉ al 57jara kamaradino, kies avo mortis ĉe la batalo de Verduno, oni malpermesis dialogi kun la eksbatalantoj.

En Charny, kie ni tendumis reveninte de Douaumont, ni povis diskuti kun la loĝantoj kaj ĝendarmoj. Lundon la 9an ni iris al Verduno, kie ankoraŭ okazis publika debato. Venis multaj loĝantoj, probable pro la ĉeesto de "steloj" kiel Roger GARAUDY kaj pastro TOULAT;

Bedaŭrinde, tiuj loĝantoj kontentiĝis per nura aŭskultado de la marŝantoj, kaj nek la verdunanoj nek la eksbatalantoj aŭdacis preni la mikrofonon. Post la debato, oni montris la filmon "La bombo" kaj filmon faritan de hispanaj obĵetantoj.nun en karcero.
Tiu ĉefa parto de la marŝado (ĉar ĝi daŭriĝis en Sardinio) fini ĝis per manifestacio en la urbo Verduno. La decido silentadi dum la p asado ĉe la militaj tombejoj de tiu urbo estis tre konscience respektita de ĉiuj manifestaciantoj senescepte.
Poste, liberecana kamarado faris per mikrofono tre taŭgan paroladon klarigante al la verdunanoj ĉion, kion ni estus ŝatinte esprimi en Douaumont. La loĝantaro de Verduno estis tre favora, la lokaj gazetoj rilative objektivaj. Multaj homoj venis al la fenestroj por fari amikajn mansignojn ĉe nia pasado. La nuraj kontraŭantoj estis kelkaj paraŝutistoj starante ĉe transversaj stratoj, sed ili silentis kaj ne intervenis. Posttagmeze, delegacio de la marŝantoj estis akceptita en la urbodomo.
Do, resume, la marŝado ne vekis la multegon de skandaliĝoj, kiun antaŭ vidis kelkaj. Oni ne devas havi iluziojn : la konsciigo de la loĝantaro pri armeaj problemoj probable necesos longan tempon. Sed mi pensas, ke kelkaj ĝermoj por tio estas semitaj.
La propagandon pri Esperanto dum la marŝadofaris mi mem kaj cisalpina italŝtatano, kiu provis konsciigi la marŝantojn pri la ligo inter Esperanto kaj la lukto de minoritatoj kontraŭ la lingva imperiismo. Ĉar disponeblis afiŝhomilojn por individua esprimado dum la marŝado, mi faris al mi afiŝon en Esperanto. En Verduno, mi povis fari standon per broŝuroj pri neperforto kaj pri anarkismo eldonitaj de k-do Baudé. Finance mia agado havis nenian rezulton, sed propagande mi povis paroli pri Esperanto kun multaj marŝantoj, kiuj estis ĝenerale favoraj al ĝi, kaj disdoni 50 franclinvajn flugfoliojn pri Esperanto kiel ilo por la paco, kiujn sendis al mi Kribo.
P.S. : la 2 arestoblaj ICI-armerifuzantoj Jean FABRE kaj Philippe BALLENGHIEN estis ankoraŭ liberaj post la manifestacio en Verduno.

---

KRUCVORTENIGMO

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| A | | | | | | | | | | | |
| B | | | | | ■ | | | | | ■ | |
| C | | | | | | | | | | | |
| Ĉ | | ■ | | ■ | | ■ | | | ■ | | |
| D | | | | | | | | | ■ | | |
| E | | | | ■ | ■ | | ■ | ■ | | | |
| F | | | | | | | | | | | |
| G | | ■ | | | | | | | | | ■ |
| Ĝ | | | | | ■ | | | | | | |

A. Necesa por fari LJP-on.
B. Inv : Efektive - Trinkaĵo malpermesita dum la preparado de LJP.
C. Tiaestas LJP.
Ĉ. Sufikso - Leteroj de Laŭrenco.
D. Ne ekzistas por LJP. El la reĝo.
E. Inv : termino de dialektika sistemo (R.) - Inklino.
F. Multnombraj en la LJP-teamo.
G. Meĥanikisto (R.)
Ĝ. Kruelega, kiam ĝi estis sankta (R.) - Titioj.

1. Nur ĝi gvidas la LJP-teamon.
2. La ĉefa farado de LJP-teamo (R.)
3. Fari, kiel ni faris kun la nombro de la abonantoj de LJP.
4. Virnomo - Parto de vira seksorgano (R.)
5. Latina nomo de virino - Prabovo.
6. Ne malamu sen ordo ! - Karapaco (R.)
7. Progresigi (R.) - Fariĝi.
8. Fluas dum la LJP-preparado - Inverse tordita (R.)
9. Tri el tioleto - Estu sen ordo.
10. Dormas dum la tuta vintro.
11. Bigaradoj, kiam ili estas maldolĉaj.

Solvo : en la venonta numero de LA KANCERKLINIKO.

Sekretario : Jak Le Puil, kun la objektiva komplicemo de D.O. Silono.
Kasisto : Laŭrenco Septier, barono de Lazarusville.

HUMURO NULA

Ebriulo hazarde renkontis Zamenhof. "Hik ! Kion vi faras ĉi-tie ? Hik ! Kalvaj ĝemeloj ?".
Al tio, la kreinto de Esperanto tuj respondis : "Ne estas afable al vi rimarkigi mian mi-opecon !".

(vere nula, ĉu ?)

*

NIA ENCIKLOPEDIO

Adaptita (malfacile kaj penige) far la ruĝverda suno de ĉies koroj, nia grandega K-do Jak Le Puil, el franclingva "Petit Campion Illustré".

BABELO Unua sidejo de UNO
BETOVENO (Ludwig van) Surdulo (I770-I827)
BIBLIO Erotika-poetika libro.
BONAPARTO (Napoléon) Korsika bandito (I769-I82I)
DIO la filo Bastardo
DIOGENO Enuiga enujulo
GALILEO Ĉefherezulo, kiu firme asertis, ke la Tero turniĝas (I564-I642)
HITLERO (Adolf) Aŭstra pentristo, kiu malbrave forlasis la pentrarton (I889-I945)
KANDIDO Kultivisto
KOLUMBO (Kristoforo) Inventisto de la malmole kuiritaj ovoj (I45I-I506)
LE PUIL Enciklopediisto (I940-ĉ.2053)
METUŜELAĤ Hebrea patriarko, kiu antaŭtempe mortis je la 969-a ago. Dumviva karieremulo.
ODISEO Turisto
SANKTA SPIRITO Anoncanto de la artefarita fekundigo
STALINO (Joseph) Ĉaro nacia-komunista (I879-I953)
VAN GOGH Duonsurdulo
ZAMENHOF (Wolfgang Amadeus) Frato de Piotr Iliĉ Zamebhof, kaj inverse.

*

VOLAPÜKA ORDENO

Ĉi-monate, senhezite ni kapablis atribui nian premion al "REFORMADOR" de julio I976, organo de spiritistaj braziloj, kie ni legis tion : "La mediumeco de Zamehof evidentiĝas en diversaj lokoj de lia poemoj kaj paroladoj. Lia lasta verko, interrompita de la morto, estas skizo de spiritualisma kredkonfeso. Li ĉiam tenis kajeron kaj krajonon sur la tableto ĉe litkapo por noti la bonajn ideojn, kiuj venadis al li, kiam li estis enlitiĝinta. Liaj humanaj sentoj estis plej noblaj. Li estis kuracisto de malriĉuloj en unu el la plej malriĉaj kvartaloj en Varsovio.
Pro ĉio tio la spiritisma familio akceptas kaj diskonigas la internacian lingvon, konsciante, ke ĝi servas la Homaron, kiu tiel sopiras pri la regado de paco kaj kompreno.
(El la libro "Grandes Vultos de Humanidade e o Espiritismo", tradukis Ismail Barbosa Teixeira.) ".

*

HUMURO NULA (due)

Iam okazas grava malkovro kontraŭ rasismo : oni eltrovis la rimedon, por ke nigruloj blankiĝu. En familio, ĉiuj membroj decidas uzis la novan medicinon. Bedaŭrinde, kiam ili ĉiuj blankiĝis, la plej juna infano diras : "Ne! Ne! Mi volas resti nigra !". Malgraŭ la daŭra insistado de l'gepatroj, li rifuzas preni la medikamenton. Kaj tiam ekkrias la patrino : "Nur de dek minutoj ni estas blankaj, kaj jam la nigrulaĉoj nin tedas !"

(ankoraŭ pli nula, ĉu ?)

*

## AL J. LEPEIX

Sed, kiam mi premas
Cian dian korpon,
Kiom mi ĝuemas
Ci-tiun akordon !
O ! Gojego ekstrem '!
Sublima embaras '!
Car la ĉielo mem
Ja en mi veturas !

Tra D.O. Silono
(noto : klarigo en la venonta numero)

## RUB-BRIKO

Infanino mia, trifoje ci vivis,
El muro malalta ci ŝtopis trueton,
En ridoj redaktaj ne faris brueton,
Sed tamen poemojn seme kolektivis.

Angula ci estis, laŭ faka titolo,
Sed stratoj pli larĝaj trakuru la urbon ...
Car mureto ĝena ja kreas perturbon,
Briketo troviĝas ĉe tera tavolo.

Por mia ĝardeno mi ŝtele cin prenos.
Ĉirkaŭos ci verŝajne fajron de ĝojo,
Kaj centmetro fore de la ĉefa vojo,
Kvieta por ĉiam, forgesi ci penos ...

Jopedan

## Al la italaj virinoj post la kemia katastrofo. 1976.

Venenis la frukton en via utero
moderna barbaro
la feton senkulpan kripligis, mutilis
kemia "eraro".


la ĝoja atendo de bebo naskota
ŝanĝiĝis en ploron
timego, teruro pri l'sorto fatala
plenigis la koron.

estas abortigo la nura rimedo
savanta, humana
sed baras ĉi vojon rigide, dogmeme
dekret'vatikana.

defiu la pastron kaj spitu la papon,
ribelu virinoj !
nur viaj la povo, decido, responso
kaj for la doktrinoj !


al vi, la virinoj, la Dio ĉiela
la naskon konfidis
al via zorgemo, prudento, kompato;
vin pastroj perfidis.

Rejna de Jong.




Matenan maltrankvilon ĉerpas
memserv-butik-aĉetoĉaro,
bebveturilo malkovrita
en la sovaĝa duonmetro
de trotuaro ĝis ĝardeno
... hieraŭ inter dornojn
falinta - kun plenplena korbo -
biciklo, kies radoj turbas.

El "Teksoj", Kris Long.




Translogîĝante mi heredas
etan terpomon en tirkesto
ŝosantan : jen elkreskas
tuberaj korpoj, longaj koloj
tralume verdaj kun purpuraj
pintoj - scienc-fikci-estuloj
ĉiuj rigardas alumet-
skatolon, tuta familio
klasike staras : laboristojn
libero sur la barikadoj
agitas, pelas ... mi balau

El "Teksoj", Kris Long.



Noto : post la legado de la antaŭa paĝo, tajpita de Raoul van la respondeculo de ĉi-rubriko informas la legantojn, ke li kulpas nek pri la tajpe-rarxxxwoj, nek pri la ilustraĵoj. (NODOLORO)

Recenzo de Jopedan kiu ne komencus per laŭdo al mi mem estas ja ne pripensebla. Se tion vi opinias, vi eraras. Mi tuj parolos al vi pri poezia libreto kiu riĉigos vin multe pli amplekse ol ĝia aĉeto kostos al via monujo. Aĥ ! Eble kelkaj, por kiuj, poezio estas seninteresa afero, ĝuste legos ĉi-tiun artikolon pro la fakto ke mi parolis pri mono. Ne revu, ga-amikoj ! Tiun libreton mi ricevis senpage, des pli riĉiga ! Sed ni iomete serioziĝu.
Daphne Lister estas ĝisosta poet-ino. Ŝi neniam provas atingi la senĉesan aridan intelektismon kiu karakterizas kutime la altnivelan seninteresan poezion. Ne. Ŝi provokas ĝuon, tute simple.
Tra tiu libro, vi ekkonos iun riĉaniman homon, akceptinte sian surteran vivon malgraŭ ĝiaj difektaĵoj. Ekkoni, jes, jen la prava esprimo. Inter lokusto kaj formiko, inter abismo kaj kompato, inter biero kaj kunvenoj, la intereso balanciĝas, montrante finfine kion pli karakterizas nin : la kontraŭdiroj.
Ĉio tio estas nur la enhava-parto. La forma parto same allogas. Ni komparu tion al la kompono de menuo far dommastrino. La pladoj sekvas sin, de liber- al rigid-formaj, de limeriko al epigramo, kaj ĉiam rimo venas, indikante la salpinĉaĵon kiun nur epikuristoj kapablas aprezi. Fine, bona manĝo.

Jen tro laŭda recenzo. Nun, mi kriti-kos, ankoraŭfoje mi kritikos. Mia ĉefa kritiko estas terura :
"Kial nur 60 paĝoj ?"
Eble Daphne Lister jam respondis :
"Kiu multe kritikas
ĵaluzon indikas."

JOPEDAN recenzis libron de Daphne Lister, "Ĝis nun", kiun eldonis Esperantaj Kajeroj, 1976.

Sur mia apartament-balkono
nek lavitaĵoj pendu nek
legomoj kresku : restu bek -
promen-fek-ejo por kolomboj
(oficiale : bruleliro)
Neniu vento blovos florojn,
sed tamen en la blua pelvo
bonvolu, polv-tavolo, kovri
oranĝon, pomon kaj bananon
por bonvenigi la arban urbon
eĉ tra malpuraj vitroj - jes,
mi rajtas viŝi la fenestrojn !

El "Teksoj", Kris Long.

Libera adapto en esperanto de poemo ne skribita de Isidore Isou (sed kiun li estus povinta skribi) :

Urgl wsygl burglle duotru jouarg,
strucks wagurn trupptk
walalalalalal
urtj prouvu l          vulgram provul grulg
skrajtp tititititititi
jujujipoi poi klurk
ferdtujn po lmk io f   c v v f
trfe n tn rnu g g g g g g g g g g g g g g g g g g g
termo molu pli plilul pliu pilu pliu pilu
graboze
glozable
gr g r g r g r g r g r
wargle guuuu g h b u j

Nxoxxnoto : post la legado de ĉi paĝo, la respondecuwqlo de la rqubriqo informas la legantyqj, que li demisisas, demisias de sia posteno ĉitie ĉar vere la tajpintøo troigis.

# LA KANCERKLINIKO

politika kaj kultura revuo n° 0



**PREZIDENTO MAÙ ZEDONG FORPASIS !**

La Kancerkliniko : Jopetro Danvy, 6 rue Jean-Dolent,
F - 75014 Paris - Trimestriel - Hiver 1976 - Prix : 5,00 F.